LSG FORUMO nr-o 147 (2/2012)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

# SALUTVORTOJON DE RANDY

Bonvenon al nova numero de Forumo. Mi volas funde danki la teamon, kiu ebligas ĉi-bultenon.

Estis 39 respondoj al la enketo pri la organizo. El tiuj 24 estis de membroj, kaj 21 regule legas Forumon. La plej ofta respondo pri la demando pri kial oni membriĝas en LSG estis por trovi amikojn kaj/aŭ amantojn. La plej ŝatata parto de Forumo estis gejaj novaĵoj el la tuta mondo.

Ĉi numero estas plenŝtopita de novaĵoj el tra la mondo, do ĝuu! - Mi donos pli ampleksan analizon de la enket-rezultoj en la venonta numero.

Mi ankaŭ volas saluti tiujn, kiuj bonŝancas kongresi en Vjetnamio kaj tra la mondo. Bonvolu provi renkonti aliajn liganojn ĉe Esperanto aranĝoj.

Mi venonte kongresos ĉe la 2013 UK en Islando, kaj esperas ankaŭ ĉeesti la 2014 UK en Argentinio - ambaŭ landoj kun samseka edz(in)iĝo. Espereble mi vidos multajn el vi tie. Intertempe mi ĝojas aŭdi de la membraro, precipe se iu havas inklinon voluntuli. Ĉiam estas bezono de artikoloj por Forumo kaj daŭre mankas respondeca redaktisto.

## SAMSEKSAJ PARAJ ANTAŬ LA ALTARO – EMBARASO ENKRISTANAJ EKLEZIOJ

Eklezioj havas problemojn: ĉu samseksamo estas peko aŭ ne? Iuj komprenas la sanktajn skribaĵojn en fundamentalista maniero kaj diras, ke religio ne toleru tiaspecan homan konduton. Tiel Benedikto la 16a, la estro de la rom-katolika eklezio akre kontraŭas ajnan toleremon de samseksamo. Aliaj ekleziuloj, sed precipe teologoj, ne havas tian radikalan opinion. Laŭ ili la Biblio entute ne parolas pri samseksamo tiel kiel ni konas ĝin hodiaŭ kaj tial la Biblio ankaŭ ne povas kontraŭi tiun fenomenon.

Dum la eklezioj ankoraŭ marŝas en cirkloj, la socio evoluas sen atendi ilajn verdiktojn . En multaj landoj jam ekzistas leĝoj por samseksa partnereco kaj edziĝo, Tial iuj fortoj, precipe en protestantaj eklezioj, debatas, ĉu eblas beni kaj edziĝi en la preĝejo samseksajn parojn.

*”Kristana koncepto de la homo”*

La sveda eklezio enkondukis jam en 2009 riton por edziĝi samseksajn parojn. Tiam iuj luteranaj eklezioj en Afriko, sed ankaŭ la ŝtata eklezio de Anglujo protestis kontraŭ tiu nova rito. Tial opiniis episkopoj Hill kaj Hind, ke tiu decido estis ”radikala redifino de la baza kristana kompreno de la homo”.



*Kampanjo en la anglikana eklezio kontraŭ samseksaj edziĝoj*

En la Unuiĝinta Reĝlando la registaro de David Cameron anoncis reformon de edziĝo kaj samaj rajtoj por paroj de la sama sekso. La angla eklezio kampanjis kontraŭ tiu iniciato kun la argumento, ke la leĝo pri civita partnereco jam donas sufiĉe da rajtoj al paroj de la sama sekso. Ili ekkampanjis kontraŭ samseksa edziĝo kaj sukcesis kolekti 500’000 subskriboj por subteni ilian reziston. En junio ili decidis, ke ili definitive ne subtenas tiun leĝproponon.

*Samtempe aliloke en Eŭropo*

Danlando enkondukis en junio 2012 edziĝan ceremonion por samseksaj paroj. Nur la naciista (kaj ksenofoba) Dana Popola Partio kontraŭis la leĝpropon. Dume la dana ŝtata eklezio frontas aliajn problemojn. La plejmulto de la episkopoj ja favoras riton por edziĝi samseksan parojn. Sed estas fortaj dekstraj fortoj ene de la eklezio sur pastra nivelo opozicias. Iliaj subtenantoj emas forlasi la eklezion en protesto kontraŭ reformoj. –




*”Ĉi-tie ni entombigas eĉ stultajn pastrojn de Aalborg” – pastro en Kopenhago reagas al ago de sia kolego en alia dana urbo*

Aliaj forlasas la eklezion por protesti kontraŭ dekstraj tendencoj. La nombro de tiuj, kiuj forlasis la eklezion kreskis en en la unua kvaronjaro de 2012 je 66% kompare al antaŭaj jaroj. – La pastroj decidas mem, ĉu ili volas plenumi la riton aŭ ne. –

Dume en Danlando eĉ estas pastroj, kiuj rifuzas entombigi gejajn personojn. Kelkaj komprenas la mesaĝon de amo, kiun predikis Jesuo en tro bizara maniero…

W

# "NENION POR FIERI": GEJE PARADI EN ORIENTA EŬROPO

Aleksandro Lukaŝenko, persista prezidento de Bjelorusio, iam klopodis esti sprita, sed konfesis reale, ke li estas diktatoro. ”Mi estas pli volonte diktatoro ol gejo.” Li eldiris tiujn vortojn post kritiko de sia reĝimo al la germana ministro por eksterlandaj aferoj, Guido Westerwelle. Tiu estas gejo kaj vivas malferme kun sia partnero. Jam antaŭe la diktatoro Lukaŝenko malkaŝis siajn homfobiajn tendencojn: en 2011 li admonis Westerwelle vivi la vivon "kiel normalulo". Poste li pardonpetis, sed konfirmis, ke li ”ne ŝatas” gejojn.



*Ankaŭ el najbaraj landoj alvenis partoprenantoj por demonstracii en Pollando*

Dum la "parado por egaleco" en junio en Varsovio videblis afiŝoj kun la teksto: Pli volonte gejo ol diktatatoro. La organizintoj nomis ĝin “parado por egaleco”, ĉar laŭ ili ne estas okazo por *geja fiereco* en Pollando. Ili volis unue montri al la socio la multfacetan human vivon. – Samtempe la polico notis 13 demonstracioj kontraŭ gejoj en Varsovio.

La unuaj gejaj paradoj en **Latvio** estis skandalaj. La nova urbestro hontis pro la sinteno de sia dekstre-naciista antaŭulo. La ĉi-jara manifestacio okaze de Christopher Street Tago estis trankvila. Partoprenis inter alie Edgar Rinkevics, ministro pri eksterlandaj aferoj.

**Slovakio** organizis por la tria fojo ĉielarkan paradon. Antaŭ la parado faŝistoj kaj ekleziuloj klopodis malhelpi la aranĝon. Plejparte la politikistoj en Slovakio estas kontraŭ lgbt-rajtoj. Politikistoj el okcidentaj EU-landoj subtenis la paradon.



*Malgranda sen ĝena manifestacio en Split*

En la **kroata** urbo Split okazis ĉi-jare trankvila parado. En 2011 kontraŭ-demonstrantoj atakis la paradon. Tial la ĉi-jara parado estis en la  fokuso de la Eŭropa Unio, ĉar Kroatio esperas aliĝi al

EU en 2013. La urbo klopodis eviti konfliktojn kaj ne permesis kontraŭdemonstraciojn. Kelkaj politikistoj apogis per ĉeesto la paradon.

Alimaniere en **Rusio**: Tie la supera kortumo jam malpermis ajnan gejan paradon ĝis 2112 – por 100 jaroj pro ”sekurecaj kialoj”. Nikolaj Aleksejev, aktivulo de geja organizo, anoncis 102 paradoj por la sekvontaj 100 jaroj – ĉiuj estas malpermesitaj. En Sankt Peterburgo la urbo malpermesas ”propagandon por samseksemo”. (Ili tamen ne difinas, kion inkluzivas tiu leĝo. Ekzemple estas dubo, ĉu informo pri aidoso povas esti komprenata kiel tia propagando.) Nun oni diskutas ankaŭ en aliaj urboj pri la enkonduko de simila leĝo, aŭ eble eĉ sur landa nivelo - laŭdire por proktekti infanojn.



*Publika esprimo de malsamopinio estas maloportuna en Ruslando. Policanoj forprenas demonstrantojn.*

En Ukrainio la situacio malboniĝas. En Kievo lokaj aktivuloj planis paradon, sed ĝi ne okazis La organizintoj timis, ke la polico ne kapablus protekti ilin sufiĉe kontraŭ atakoj de religiaj kaj politikaj fanatikuloj. Estis la espero, ke antaŭ la eŭropa ĉampionado por piedpilko estus iom pli milda etoso en la lando, sed tiu espero estis vana.

W

## PLI VIROJ TRANSSEKSAJ ESTAS NASKATAJ

Dum la lastaj monatoj aŭdiĝas raportoj de Ameriko, Israelo kaj Anglio pri transseksaj viroj, kiuj naskis infanon. Eĉ se la klaĉa gazetaro ŝatas paroli pri nova evoluiĝo, la naskoj de tiaj viroj ne estas nova fenomeno.

Kiam en 2008 cirkulis la novaĵo, ke transseksa viro el Usono estas graveda - la ekscito estis granda. Thomas Beatie kun tio sin prezentis dum la jaro en preskaŭ ĉiu postagmeza televida babilrondo. La bildo de la barba viro kun la dika gravedeca ventro kuris tra la mondo. " La nura diferenco estas, ke mi ne povos mamnutri mian bebon. Sed tion ja ne faras multaj patrinoj", gaje esplikis Beatie tiam al raportistoj de la TV-stacio ABC.

Intertempe okazis pluraj novaj kazoj: Ĵus nun aperis mesaĝoj el Anglio, laŭ kiuj lastan jaron viro je siaj finaj 30aj jaroj enmondigis filon per cezara sekco. Kaj

en decembro de 2011 ankaŭ la 24-jara Yuval Topper donis vivon al infano. Ambaŭ viroj tamen evitis la publikan fokusemon kaj protektis siajn vivojn de la okuloj de la scivolema monda spektantaro.

La sekretigo estas komprenebla: Multaj homoj ĝis nun ne komprenas la temon de transsekseco, ĉar jenaj homoj ne konguras al la kutima ulo-ino-skemo – kongruas eĉ multe malpli ol samseksemaj. Kiam krome ino-al ulo-transseksaj homoj fariĝas gravedaj, tio estas por Burĝo Normalo pura dancumo freneza. Eĉ se biologie ne okazas io multe miriga: por naski oni bezonas ovariojn kaj uteron – kaj tiuj ja ekzistas en transseksa viro antaŭ la decida operacio. Ja estas instigoj, por ke li lasu tiujn eltranĉi – fakte la traktado per hormonoj altigas la riskojn por ovaria kaj utervalva kancero – sed se li ne lasas, la organoj funkcias tiel, kiel la naturo ilin formis. Ekzistas raportoj, ke operaciitaj transseksuloj lasas enfrostigi siajn ovariojn por spite ricevi pli poste proprakorpan infanon. Tiu tamen devas koviĝi en lupatrino.

Cetere estas nura famo, ke nasko infanojn per viroj estas novega temo. Ja ekzistas raportoj, ke la itala soldato Daniel Burghammer en la jaro 1601 – kaŭzante hororon al siaj superuloj kaj edzino – enmondigis infanon. Burghammer post tio konfesis, ke li posedas kaj ulajn kaj inajn sekserojn – fenomeno, kiun oni hodiaŭ nomas "interseksecon". Burghammer povis sian filinon, kies biologia patro estis hispana soldato, eĉ mamnutri. La infano krome ricevis la benon de la eklezio, kiu deklaris la naskon esti "miraklo".



*Thomas Beadie kun sia ankoraŭ nenaskita bebo*

Hodiaŭ ofte diskutiĝas la demando, kiom senchava estas, ke transpersono naskas infanon. Psikologoj skrupulas pri la evoluiĝo de la infano, dum religiecaj homoj sin retiras en pli simpla mondo, en kiu la diferenco inter viro kaj virino ankoraŭ estas klara. En la reala mondo kontraŭe, la situacioj estas pli komplikaj: Thomas Beatie ekzemple, kiu intertempe naskis tri infanojn, fariĝis "patrino", ĉar lia edzino ne kapablis gravediĝi. "Mi estas homo kaj havas la rajton je biologia

infano", tion li ĵetis kontraŭ kritikantoj dum babila rondo. En lia situacio, li diris, oni devu rikolti, kion la naturo ja donacis al iu. (februaro 2012)

Fritz-Ferdinand

## LIBIO DEKLARAS EN UN: "GEJOJ MINACAS HOMARON"

La nova Libia registaro komencis sian unuan alparolon antaŭ la UN-Konsilantaro por Homaj Rajtoj per akra atako kontraŭ samseksemuloj.
Kiel la neregistara organizo "UN-watch" mesaĝas, la Libia delegito dum sia unua proklamo komence de februaro akre kritikis la politikon de la Unuiĝintaj Nacioj. Li eksplikis, ke la konsilado pri gejaj-lesbaj temoj "perturbas la religion kaj dubigas la postvivadon de la homaro". Libio je la marto de la lasta jaro estis malmembrigita el la Konsilantaro pro rompi homajn rajtojn fare de la Gaddafi-reĝimo. Nur en novembro la nova registaro denove estis akceptita kiel membro.

La "novan" Libion aparte pikas rezolucio Konsilantara de junio 2011, per kiu la unuan fojon estis kritikata la diskriminacio de gejoj kaj lesboj en la mondo. La rezolucio estis akceptata je malabunda favoro de 23 kontraŭ 19 voĉoj. Subtenis la decidon la EU, la USA kaj latinamerikaj landoj, dum afrikaj kaj arabaj ŝtatoj malfavore voĉdonis. La Libia delegito klare substrekis, ke lia lando tiam voĉdonus kontraŭ la rezolucio, se lia lando ne estintus ekskludita.



*"Gejoj kaj lesboj nun pagas la prezon"*

Laura Dupuy Lasserre, la prezidantino Urugvaja de la Konsilantaro por Homaj Rajtoj kritikis Libion pro la dura retoriko. Ŝi eksplikis, ke la konsilantaro ekzistas por "defendi homajn rajtojn kaj malhelpi diskriminacion".

"UN-watch" mallaŭdis, ke Libio ne nur dissemas homofobion, sed sistemece mistraktas prisonulojn. "Tio ekstarigas la demandon, ĉu la nova reĝimo estas la pli bona", deklaris Hillel Neuer de la Orga-

nizo por Homaj Rajtoj Geneva, kiu kritike observadas la decidojn de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĉiuj okcidentaj demokratioj, diris li, estis subtenantaj la reakcepton de Libio kiel membro de la Konsilantaro por Homaj Rajtoj, kvankam la nova reĝimo en ekster- kaj enlando montris nenian sinengaĝon por homaj rajtoj. "Gejoj kaj lesboj nun pagas la prezon", diris Hillel.

La Libia punleĝaro minacas samseksajn amorajn agojn je ĝis kvin jaroj de malliberejo. Samseksemulaj grupoj en la lando estas malpermesataj. (februaro 2012) Fritz-Ferdinand

## BRITIO: PRISONPUNOJ PRO FLUGFOLIOJ KONTRAŬ GEJOJ


Tri islamanojn en Britio oni punis je ĝis du jaroj da malliberejo, ĉar ili per flugfolioj postulis la enkondukon de la mortpuno por gejoj.

Jam en junio 2011 ĵurio la punleĝa kortumo en la nord-Anglia urbo Derby juĝis kulpa la virojn 28-jarajn ĝis 42-jarajn, ĉar ili ardigis la malamon kontraŭ samseksemaj homoj. Du pliaj akuzitoj tiam estis juĝitaj senkulpa.

La estro de la grupo nun en februaro 2012 estis kondamnita de la juĝisto al du jarojn da malliberejo, la aliaj du viroj ricevis po 15 monatojn. Decidbazo por la unua tia kondamno estas leĝo de marto 2010, kiu eksplicite postulas punon kontraŭ fi-agitado kaŭze de seksema orientiĝo. Maksimume tamen oni povus kondamni tiujn virojn al malliberejo ĝis sep jaroj.

*Limoj de de libera esprimo de opinioj*

Juĝisto John Burgess diris, ke la viroj havis la celon dissemi malamon en paca komunumo. La akuzitoj en la jaro 2010 ĉirkaŭe de moskeo disdonis ĵus antaŭ CSD-aranĝo flugfoliojn kun la titolo "The Death Penalty" (la mortpuno) kaj tiujn ankaŭ ĵetis en najbaraj poŝtkestojn. Sur la flugfolio estis montrata kole pendigita ligna pupo.




*En Irano oni ne nur pendumas pupojn*

Apud tio estis legebla, ke samseksa amoro estas grava peko, pro kio oni finiĝas en la infero. Plie diratis, ke Alaho permesas la "detruon" de tiuj malbonaj homoj. La ŝtato rajtas, laŭ la folio, elekti sole, ĉu gejoj kaj lesboj aŭ estas pendigataj aŭ forbrulataj aŭ ŝtonumataj.

Dum la proceso la akuzitoj konfesis, ke ili disdonis la flugfoliojn. Ili tamen kontraŭis, ke tio laŭ la senco de la leĝo minacis samseksemajn homojn, kaj apogis sin je la rajto de libera esprimo de opinioj. Unu el la viroj deklaris antaŭ la kortumo: "Estas mia devo kiel islamano distribui la vortaron de Deo, ankaŭ pri samseksemo. Sur la flugfolio estas notitaj nur historiaj faktoj kaj citaĵoj el la Korano"

Dum sia juĝproklamo diris la juĝisto Burgess, ke la rajto je libera esprimo de opinioj estas de alta valoro. La parlamento tamen jam konsideris tion, kiam ĝi enkondukis la la novan regularon pri fi-agitado en la popolo.

En britaj amaskomunikiloj aktivuloj je samseksemo kaj la enloĝantoj de Derby laŭdis la juĝon, inter ili ankaŭ islamanoj. (februaro 2012)

Fritz-Ferdinand

## FORUMO BEZONAS VIN

## OBAMA, LA RELIGIAJ FANATIKULOJ KAJ LA GEGEJOJ EN USONO

La 9an de majo de ĉitiu jaro prezidanto Obama aperis en la televido kaj proklamis ke li tiam "evoluiĝis" kaj nun subtenas la ideon de samseksaj nuptoj. Komprendendas ke en Usono ne ekzistas nacia politiko pri nuptoj. Ĉiu ŝtato havas proprajn leĝojn – sed ekzistas nacia leĝo kio proklamas ke ĉiuj ŝtatoj devas respekti la nuptajn leĝojn de ĉiuj aliaj ŝtatoj. Nun, ĉar kvin ŝtatoj kaj la Distrikto de Kolombio (Vaŝingtono, la ĉefurbo, kiu ne estas ŝtato) havas samseksajn nuptojn, fakte la aliaj ŝtatoj devus respekti tion – kvankam ili NE faras tion. Eble iu devus defii tion antaŭ la plej altaj kortumoj de nia lando.



La semajnon antaŭ ol Prezidanto Obama proklamis sian akcepton de samseksaj nuptoj, naciaj esploroj montris nur 43% de subteno por tiaj nuptoj. Semajnon post la proklamo de Obama, tri sendependaj naciaj esploroj montris inter 59 kaj 64% de subteno! Eĉ la plej prestiĝa organizaĵo de negruloj en Usono, subtenis la prezidanton en sia opinio.

Interdum tri diversaj protestantaj pastoroj faris publikajn proponojn ke oni aŭ metu nin en grandegajn koncentrejojn – unu por gejaj viroj kaj alia por gejaj virinoj aŭ ke oni simple mortpafu nin ĉiujn je la nomo de ilia dio. Iu protestanta preĝejo metis filmeton en youtube en kio kvarjara infano kantas ke neniu samseksemuloj iros al la ĉielo sed rekte al la inferno. (Mi estas budhano kaj ne kredas pri tiuj lokoj, sed se fakte ĉiuj samseksemuloj de la mondo de ĉiuj epokoj troviĝus en unu loko mi certas ke ili plibonigus la lokon kaj festus kune.)

La katolikaj episkopoj, kiuj nuntempe okupiĝas pri la punado de katolikaj monaĥinoj, ĉar ili tro zorgas pri la problemoj de rasismo kaj malriĉeco kaj ne sufiĉe pri kontraŭeco de samseksaj nuptoj. Sed tiuj episkopoj ne faras proklamojn tiom obseditaj kiel tioj de la protestantoj. La konservemaj judoj silentas kvankam ili kontraŭstaras la samseksan nupton. La aliaj judoj kvazaŭ ne parolas pri tiu temo. Islamanoj, budhanoj, hinduoj, ktp ĉiuj estas malmultaj en Usono, do oni ne priatentas ilin.

Inter la du politikaj partioj, la "demokratoj" kaj la "respublikanoj", troviĝas vasta skismo. La kandidato de la respulikanoj, Mitt Romney, proklamis ke, se li estus la nova prezidanto, li malpermesus al tiuj ŝtatoj kioj jam havas samseksajn nuptojn daŭrigi tion kaj li ree enkondukus malnovan leĝon kio malpermesis al gegejoj servi en la armeo. Malgraŭ tio, kelkaj respublikanoj subtenas la ideojn de samseksa nupto.

Por ambaŭ partioj ekzistas gegejaj organizaĵoj: Ĉe la demokratoj en Florido *La Delfenaj Demokratoj* (delfeno - la ŝtata fiŝo de Florido) kaj la *Ŝtipokabanaj Respublikanoj* (Lincoln, la fondito de la Respublikana Partio naskiĝis en ŝtipokabano). Por gegejoj en Fort Lauderdale ekzistas multaj malgrandaj eklezioj: Dignity (Digno) por katolikoj, Integrity (Honesteco) por protestantoj, Ez Chaim por judoj, Drolma Templo por budhanoj kaj Gay Mosque (Geja Moskeo)

Robb

Sekvontfoje: Raporto pri Geja Fiereco en Florido la 24an de junio.

**VIGLIGU FORUMON !**

# KONGRESLANDA TEMO - VIETNAMIO

Evidente nur malmultaj anoj de nia Ligo partoprenos UK'on en Vietnamio, sed ni tamen opinias, ke jen estas bona okazo por foje rigardi al la situacio de lgtb-personoj en tiu lando.

*Leĝo*

Vietnamio neniam havis iun kontraŭgejan leĝon. Nek la leĝaro de la Le dinastio, nek u de la Nguyen dinastio menciis samseksajn agojn. Tradicie Vietnamo sekvis la leĝojn de Ĉinio, sed estas notinde, ke Vietnamo ne transprenis la ekzemplon de Qing-dinastio, kiu enkondukis punojn por samseksa amoro.



Tamen estas kelkaj procezoj kontraŭ viroj, kiuj amoris alian viron, sed tiam temis pri adulto, Aliaj estis kondamnitaj pro perforto.

La francoj enkondukis sian Code Napoléon ankaŭ en la kolonioj kaj tiu jam forprenis samseksan amoron jam el la leĝo.

La moderna Vietnamio ankaŭ ne havas leĝon, kiu krimigas samseksajn agojn. Tamen estas iuj mal-precizaj mencioj pri ”subfosado de publika moralo”, kiuj taŭgas por eventuale puni samseksajn agojn.


Do oficiale la ŝtato ne havas sintenon al gejoj. Tamen la "publika moralo" estas ĝenerale konservativa, speciale en la norda parto de la lando.

Dum la vietnama milito estis drinkejoj por gejoj kaj lesboj en tiama Sajgono (nuna Ho-Ĉi-Min-Urbo).

*Publika sinteno*

De tempo al tempo la reĝimo kampanjas kontraŭ la ”socia malbono” samseksamo. Ili postulas, ke gejoj infiltras turismon, karaoke-drinkejoj kaj restoracioj per sia ”bizaraj kondutoj”. Samtempe gejoj ricevas la kulpon por kresko de prostitucio, misuzo de drogoj kaj aidoso.

Do gejoj vivas marĝene en la socio. En 2011 kuraĝa reĝisoro klopodis ŝanĝi la publikan sintenon al tiuj ”sociaj malbonoj”. Per *Perdita en Paradizo* reĝisoro Ngoc Dang Vu rompis tabuojn, ĉar li rakontas favore pri samseksamo. Khoi forkuras de sia hejma vilaĝo kaj provas komenci novan vivon en Ho Ĉi Min Urbo (kion lokanoj nomas Paradizo). Tie li enamiĝas en prostituiston Lam, sed Khoi ne ŝatas la laboron de Lam. Finfine li revenas al sia vilaĝo kaj klopodas enspezi monon por studado. Kompreneble unu filmo ne povas ŝanĝi tradician marĝenigon.




*Perdita en Paradizo – paŝo al ŝanĝo de publika opinio?*

Ŝanĝoj ja eblas: en 2001 82% diris dum enkedo, ke samseksamo estas ”neniam akceptebla”; en 2007 80% deklaris, ke samseksago ne estas malbona ago. – Gejoj en Vietnamio rajtas esperi pliboniĝon de ilia situacio.

W



*Estonta ligano?*

## PLIAJ MALAMIKOJ DE ALAO

En majo 2012 la reĝimo en Tehrano denove kondamnis kvar virojn el la urbo Ĥoram en la provinco Kohgiluyeh kaj Boyer-Ahmad pro "sodomio" al morto per pendumigo. Ili estas Vahid Akbari, Sahadat Arefi, Javid Akbari kaj Hushmand Akbari. Ekde 1979 Irano ekzemkutis ĉ. 4000 malamikoj de Allah.

Nur malofte la ĝenerala gazetaro raportas pri tiuj abomenaĵoj. Tiu informo fontas el la aŭstra gazeto *Der Standard*.



*Malamikoj de Alaho havas mallongan vivon en Irano*

## PRI FORUMO

Tiu eldono de via Forumo aperas bedaŭrinde kun ioma malfruiĝo. Eble vi memoras, ke nuntempe via (aŭ pli precize nia) Forumo estas sen redaktoro. Anstataŭe estas kelkaj redakcianoj kun vage difinitaj laborkampoj. Bedaŭrinde la redakciano, kiu kutime faras plej multe de tiu laboro estis malhelpata dum la lastaj monatoj.

Estas tamen la ambicio, spite al malhelpaĵoj, aperigi Forumon en pli malpli regula ritmo.

Se vi sentas, ke la neapero de Forumo estas manko en via vivo, aŭ perdo por nia Ligo, vi povas fariĝi kunlaboranto aŭ eble eĉ redaktanto. Forumo bezonas Vin.

Anoncu vin hodiaŭ ĉe la sekretario de LSG (vidu la adreson en la kolofono).

Se estas sufiĉe da kontribuoj, ni planas almenaŭ du (eble duoblaj numeroj en 2012). Ni dankas anticipe por via pacienco.

W – por la nevidebla redakantaro


**KOLOFONO:**

Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

interretejo: http://lsg-esperanto.org
membriĝo: ĉe la sekretario
kotizoj: 12 € por 1 jaro / 30 € por 3 jaroj / 300 € por dumviva membreco



Prezidanto: Randy [laprezidanto@gmx.net]
Sekretario kaj Kasisto: Rolf [lakasisto@gmx.net] [lasekretario@gmx.net]
Estrarano por varbado: Sebastian [kirf@gmx.de]
Kromaj Estraranoj:
Arnold [arvimide@earthlink.net]
Harry [phsb@orange.net]
Francis [fsoghomonian@yahoo.fr]


Sendu abunde kontribuojn por via membrogazeto FORUMO antaŭ la **31a de aŭgusto 2012** al:
[laredaktanto@gmx.net]
aŭ al la helikpoŝta adreso de la sekretario.

***Nepre ne kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono ne estas ligano. Nur pro la favoraj poŝt-tarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio.***